

Fernando Ortiz: verko deklarita kultura heredaĵo de la insulo



La verko de la kuba saĝulo, dro. Fernando Ortiz, estis deklarita kultura heredaĵo de Kubo, aranĝo kiu konfirmas la kompromison de la ŝtato kaj ŝiaj institucioj pri ties konservado, gardado kaj speciale, ties promociado kaj diskonigo inter la nunaj kaj estontaj generacioj.

En ceremonio okazinta en la aŭlo de la universitata kolegio San Gerónimo, en la historia centro de Havano, ĝuste en la 138-a datreveno de la naskiĝtaĝo de Ortiz, Gladys Collazo, prezidantino de la nacia konsilantaro pri kultura heredaĵo, publikigis la deklaron, raportis la gazeto Granma.

Rekte implikitaj en la valora heredaĵo de la elstara intelektulo, estas la nacia biblioteko José Martí, la instituto de literaturo kaj lingvistiko, la domo de Afriko, la nacia muzeo de la muziko kaj la fondaĵo Fernando Ortiz, kies prezidento, la poeto kaj etnologo Miguel Barnet, skizis taksis la kontribuojn de sia maŝtro kiel la plej eksterordinaraj en la branĉo de la sociaj sciencoj en Kubo laŭlonge de la 20-a jarcento.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/cultura/196345-fernando-ortiz-verko-deklarita-kultura-heredaĵo-de-la-insulo>



Radio Habana Cuba